

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencej.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencej

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

Nro 86 (Eighth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 agosto 1927

KVINSLANDA RADIO-SERVO ALLASAS ESPERANTON.

La radio-servo de Kvinslando estas ĉiutage entreprenita, kaj ĝis nun rifuzis ĉiujn proponojn pri disaŭdigoj pri aŭ Esperanto, malgraŭ ke en aliaj ŝtatoj de nia federacio la privataj radioj de longe okupas sin pri nia lingvo.

En lasta tempo la Brisbanaj samideanoj rekomencis sian atakon, kaj ank' al la klopodoj de sinjoro Kidd, la agema vicprezidanto de la Brisbana Esperanto-societo, la direktoro cedis, kaj permesis serion de ses paroladoj, kaj mem aludis eblecon de kurso sekvonta la serion de paroladoj.

La unuan parolon faris nia konata samideano doktoro F. J. Williams, neksemaĵna vizitanto al Kvinslando, ĉiun antaŭ du semajnoj parolis el la stacio 4QG je la temo: Travivaĵoj kun Esperanto en Ĉinujo. Lo horo difinita por la paroloj estas ne oportuna por multaj aŭskultantoj, nome la 15 ĝis 6, 30 vespere; tamen ĵam alvenis ne malmultaj respondoj de diverslokaj interesatoj, kiuj serĉas informojn pri nia movado.

“La Suda Kruco” petas ĉiujn, kiuj aŭdas la parolojn (de kiuj ni poste anoncos la plenan programon), skribi al “Esperanto, 4QG, Brisbane” esprimante sian ŝaton kaj la esperon, ke ĉi poste donos kurson de instruado pri la lingvo.

BABEL AND THE WILY CHINESE.

“The Age” tells of an instance of the readiness to turn to account the difficulties of languages at the League of Nations. At the Assembly that Mr. Latham (Attorney-General) attended, the President was a Servian, who understood French, but not English. The Chinese representative gave notice that he wished to present an encyclopaedia to the League, and mounted the tribune to make some appropriate remarks. Speaking in English, he intimated his intention to make the gift, but having done so, he forthwith proceeded to launch a bitter attack upon Great Britain and the British policy in China. The English-speaking representatives listened in amazement, but the chairman, not understanding the drift of the remarks, did not intervene. Only when the speech was later translated into French did he perceive that it was grossly out of order, and a spirited reply to the charges was made by Sir R. Cecil. The moral is obvious. Much embarrassment would have been spared certain parties had the medium of speech been Esperanto.

RADIO.

Ĉe vesperfesto aranĝita de la Hel-sinkiaj esperantistoj, radio-paroladoj en Esperanto el Melbourne kaj Londono precipe Melbourne estis bone aŭdebla.

KRONIKO.

MELBURN, V. — Kelkaj anoj de la Melburna Esperanto Societo renkontiĝis ĉe Bell, antaŭ kelka tempo, kaj promenis ĝis Heidelberg. Ili tre ĝuis la ekskursojn kaj la interparoladon survoje. De la altaĵo okcidente de la urbo, estis videbla tre bela vidaĵo.

S-ro Hudson donis instruajn lecionojn pri Esperanto, per la rekta metodo, kiu tute kaptis la atenton de ĉiuj. — S-ro Grant interesigis ĉiujn per tre bona parolado pri la birdoj de Aŭstralio. Per la helpo de bildoj li montris al la anoj la formojn kaj aspekton de multaj ne bone konataj birdoj.

Multe partoprenis la debaton kiu okazis je la fino de la monato. Per multa parolado kaj ne multe da logiko la jesa partio gajnis pri la temo "Ĉu la kinematografio estas bona por la intelekto?"

Je julio 15a, okazis alia tre ĝuinda festo. La anoj kaj gastoj pasigis la feliĉajn horojn per dancado, ludoj, k. t. p. kaj Fino. Veronica Cox donis plezuron per kelkaj ĉarmaj kantoj. — Poste en apuda ĉambro, belete ornamita, la ĉeestantoj ĝuis kafon kaj frandaĵojn.

Interesa al la mondo de Esperantistoj, estis la leciono pri Esperanto kiun s-ro Rawson brodkastis de 3LO, en la komenciĝo de la monato.

BRISBANO. — Grava sukceso ĉe la ŝtata radio-servo; vidu la raporton aliloke.

La vizito de doktoro F. J. Williams, el Melburno kaj Ĉinujo, estis ne nur plezuro por la ĉiticiaj samideanoj, sed ankaŭ valora akcelo de nia propagando.

Agrabla vesperfesto la 2-an de julio en la domo de malnova samideano, sinjoro Norman Mille, en Moorooka. Kantoj kaj deklamoj en Esperanto kaj aliaj lingvoj. Oni ja ne forgesas, ke Esperanto-grupo ekzistas interalie por ekzercado pri la lingvo Esperanto, kaj ne pri la Angla!

Sukcesa ekskurso la 10-an de julio al Monto Coot-tha ("Unuarba Monteto").

Kelkaj utilaj raportoj lastatempe aperis en diversaj taggazetoj. La publiko estas per tio konstante memorigata, ke Esperanto vivas kaj progresas.

La kurso por lernantoj jam kunvenas en la urbo mem, en la domo

Gilbert, sur strato Queen, kontraŭ la Regna Trezorejo, ĉiun ĵaŭdon. La kursanoj estas multe ŝuldantaj al sinjoro Vitoŝinski, kiu ĝis nun afable disponigis al ili sian hejmon en la kvartalo West End.

AUCKLAND, Nova Zelando. — Dum vizito al tiu-ĉi urbo en majo, s-ro J. L. King, Del. de U.E.A. (Gisborne), bone propagandis Esperanton pentante ĉe du el la ĉefbutikoj grandajn kaj belegajn afiŝojn de la 19a Universala Esperanto-Kongreso (Danzig). Ankaŭ, parolado estis liverita al la Aucklanda sekcio de la N. Z. Laborista Partio (politika), kiu ricevis entuziasme la temon kaj la parolinton.

ROTORUA, N.Z. — En gazeto, "Rotorua Chronicle," s-ro instruisto C. J. Adcock, Del. de U.E.A., per verkaĵo propagandis Esperanton. Aligartikole, s-ro Adcock metis la aspirojn de la lingvo internacia antaŭ la legantaro, enkondukante nekontraŭstareblajn faktojn kaj pruvojn rilate al la neceso por nia lingvo, Esperanto. Ordinare, la argumentoj por Esperanto estas malnovaj, trouzigitaj kaj samaspekaj, sed tiuj de s-ro Adcock estis renovigitaj por taŭgi al la nuna periodo progressa, kaj krom tio aranĝitaj konvinkige.

WELLINGTON, N.Z. — Dum 7a julio, s-ro W. H. King ree brodkastis de stacio 2YK. La brodkasto estis la lasta parolado antaŭ ol la inaŭguraĵo de la Esperanto-kurso konsistanta el dudek lecionoj brodkastotaj de la nova kaj potenca stacio 2YA. Plenaj detaloj rilate al la kurso estis disaŭdigitaj.

Du lecionoj el serio aperanta en la radia ĵurnalo "New Zealand Radio" aperis en eldono de 9a julio.

Kelkaj ĉi-tieaj radiuloj raportas aŭdon de pri Esperanto parolado de iu stacio ĉe Melburno. Oni diras ke la klareco de la brodkasto estis bone.

PERTH, W.A. — On Sunday, 17th July, Mr. P. Newland lectured on "Esperanto—the international Language" at the Leederville Town Hall. Much interest was shown by those present. The address was concise and to the point. Mr. Newland merits praise for the admirable way he handled his subject. Other speakers followed and questions were answered by the lecturer.

During the past month a deputation consisting of F. N. Byatt and S-ro Cain waited on the State educa-

national authorities for the purpose of obtaining the use of a room in James Street School, Perth, for an Esperanto Class. Permission was freely given and gratefully accepted by the reputation.

PERTH, W.A. — On the invitation of S-ro Cain—delegate U.E.A.—a much travelled Esperantist, Edmund Zscheile, was present at the weekly meeting of the Perth Esperanto Society. S-ro Goudie welcomed the visitor in a few well-chosen words, after which our samideano gave a most interesting address on his experiences in the course of his wanderings in many countries during the past four years.

S-ro Zscheile is a cultured gentleman of German nationality. He is a most enthusiastic supporter of Esperanto, and uses every opportunity for propaganda purposes. The press in Perth published articles and paragraphs concerning the visitor, and stressed the uses he made of the international language. Although four years have passed since he left Leipzig, S-ro Zscheile will not have completed his self-imposed task of walking round the world until August 1930.

On 28th July at Burta College, S-ro Zscheile delivered a further address on "Esperanto in many lands"; a representative audience thoroughly enjoyed listening to his interesting and instructive talk.

The Black Swan (Nigra Cigno) Group of Perth, Western Australia, after a period of hibernation has once more come forth in new plumage. The Group now known as the Perth Esperanto Society has been reformed and has been holding a weekly meeting for conversation in Esperanto at "Gracemere," 277 Hay Street, Perth. This meeting will however in future be held at 14 Bennett Street. Classes for the instruction of Esperanto are being held in the James' Street Schools, and quite a number of students are being instructed in the Kara Lingvo. There is every indication that the resurrection is a permanent one and it is much to be hoped that it will be so as West Australia contains a large number of Esperantists who should value the Group in the Capital.

SYDNEY. — La loko Esperanto-Societo povas raporti la sekvantajn erojn:—

Julio 7a.—Alveninte de Moksikujo, s-ro J. Fekonja multe interesigis anojn per alparoladeto pri liaj spertoj kun Esperanto en Sud-Amerikaj respublikoj, kiujn li ĵus malrapide travojaĝis. La efiko de la lingvo estas mirinde, li diris, ĉie oni renkontas afablaj, helpemaj samideanoj. S-ro Fekonja, kiu estas Jugoslavano kaj nur malmulte parolas anglan, intencas resti dum kelka tempo en tiu-ĉi urbo kaj iĝis ano de la societo. Kiel aldono al la rimarkoj de s-ro Fekonja, Pastro Seriŝev rilatis kiamaniere li profitis en 15 diversaj landoj en Eŭropo kaj Azio per kono de Esperanto.

Ĉe pliposta eksterordinara kunsido la membroj unuavoĉe decidis fari f-inon M. Harwood, vic-prezidintino dum du jaroj kaj nun forlasante la klubon pro sanaj kaŭzoj, dumviva membro por trafe honori la multajn de ŝi faritajn servoj. Estas la unua fojo, ke la societo starigis tian altan titolon.

Julio 14a. — Laŭprograma temo estis "Aventuroj—veraj kaj . . . kiu donis ŝancon al komencantoj vice rakonti antaŭe preparitan mallongan historion por gajni memfidon kaj praktikon en la lingvo. Kompreneble, pli spertaj membroj ankaŭ helpis, ĉefe per terure malveraj aventuroj.

Julio 21a. — S-ro Pfahl okupis la atenton de la ĉeestantaro per diversaj allogaj sciigoj pri progreso en Esperantujo.

Julio 28a. — Kutima dancado okazis kun partopreno de 50 personoj. Krom solo-kantoj kaj deklamoj, anoj de la Laborista Eduka Asocio (drama sekcio) tre bone ludis la kontraktan scenon el "La Komercisto de Venecio."

* * *

Dum lastaj kvar semajnoj sekvantaj gazetartikoloj aperis:—"Sydney Morning Herald" (2/7/27), "Sunday Sun" (3/7/27), "The Sun" (4/7/27), "Labor Daily" (5/7/27), "Sydney Mail" (13/7/27), "Daily Guardian" (16/7/27) kaj "Daily Telegraph News Pictorial" (26/7/27).

Kiel sekvo, la societo enskribigis pli multajn membrojn, ol dum iu simila periodo.

Granda intetreso nuntempe okupas Sydneyanojn pri revivigita propono okazigi internacian ekspozicion ĉi-tie

ĉum 1931, kiam la enorma ponto super la haveno estos finkonstruita. Esperantistoj pensas pri mondreklando en la tre taŭga lingvo, Esperanto. Ĉu ni povas esperi?

THE BEST OLD TESTAMENT COMMENTARY.

"The originator of Esperanto is a Jew, a Hebrew with a broad mind and a wide outlook, and that has been of immense advantage to the Esperanto movement. At an early date Dr. Zamenhof began to translate and publish favorite books of the Old Testament from the Hebrew, and gradually the possibility of a complete Esperanto Bible assumed shape. Esperantists may well rejoice that he was spared to accomplish so much. It would have a great thing if the work had been done at all: but the translation has been conspicuously well done. For many years I was an examiner in Hebrew at one of our universities, and I know how difficult it is to render exactly many of the Hebrew words, and I know also that many Hebrew passages and terms are still obscure to Western and Christian minds. For years I have studied a chapter of the Esperanto Bible every day, and I am daily more thankful that Esperanto came under my notice when it did. I believe that I have never yet risen from reading a chapter without getting clearness regarding some phrase or word or shade of meaning which formerly was veiled to me. I am confident that the careful reading of the Esperanto text has been more valuable to me than the perusal of many commentaries. What the reader wants to know is the exact sense of the original: and I have seen no English or other translation that makes me feel so certain that I have got at the true meaning of the inspired author as the Esperanto does. Zamenhof's Esperanto translation is the briefest and best commentary on the Old Testament which has ever come into my hands."

—Rev. J. Beveridge, B.D., A.K.

DONACO.

La Komitato de la Viktoria sekcio de la A.E.A. donacis tri funtojn sterlingaj al la Suda Kruco. Per tiu ĉi ni kvitanças la ricevon kaj multe dankas la Viktoriaj anoj de la A.E.A. — (Red. Adm.)

PRI LA RILATO DE LA VIRINO AL LA VIRO.

(El "Sezamo kaj Lilioj" de John Ruskin).

En la jenanta elĉerpaĵo el la prelego "Sezamo kaj Lilioj" Ruskin subtenas el la verkaroj de Shakespeare kaj Scott siajn konvinkojn pri la morala supereco de la virino je la viro kaj ŝiaj pozicio kaj funkcio en la socio.

La baza utilo de eduko estas povigi nin konsiliĝi kun la plej saĝaj, plej grandanimaj homoj pri ĉiu punkto de aferoj de ni grave nekompreneblaj. Guste uzi librojn estas studi ilin por havigi al ni helpon; turni nin al ili, kiam la propraj scio kaj solvopovo mankas, kaj lasi nin gvidi de ili en pli larĝan vidspacon, pli puran koncepton ol la niaj, kaj ricevi de ili la konstaton unuigitan de la juĝistoj kaj konsilantoj de la homaro, tra ĉiuj epokoj, anstataŭ kontentiĝi je nia ŝanĝema opinio.

Ni nun faru tiel. Ni vidu, ĉu la plej grandaj, saĝaj, korpuraj homoj el ĉiuj tempaĵoj interkonsentas pri la interrilato de la virino kun la viro. Ni aŭdu la ateston, kiun ili postlasis al ni pri tio, kion ili opiniis la vera digno de la virino kaj ŝia maniero de helpo al la viro.

Unue, ni iom pritraktu Shakespeare-on.

Rimarku, ke vidate larĝe la verkaro de Shakespeare ne prezentas al ni ian ajn veran heroon: tie troviĝas nur heroinoj. Ne estas unu tute heroo figuro en ĉiuj liaj verkoj teatraj, se ne paroli pri la supraj skizo de Henriko kvina, troigita porporeneja celo, kaj la ankoraŭ pli rebule skizita Valteno en "The Two Gentlemen of Verona" (La Du Sinjoroj de Verona). En la bone prilaboritaj, perfektaj dramoj nenie troviĝas ia heroo. Otelio estus tia, se lia naiveco ne estus tiel granda, ke ĝi igas lin viktimo de ĉiuj malbonuloj de la renkontita; li estas ja la sola ekzemplo de viro eĉ alproksimiĝinta al la heroo tipo. Koriolano, Cezaro, Antonio, kun foriganta forto staras en vivo kaj pro ilia vanteco eniras ruinigitaj la tombon. Hamleto estas anm lace neagema kaj neenergie spekulativa. Romeo estas senpacienca knabo; la Komercesto de Venecio lace submetiĝa antaŭ malbona destino:

Kent, en Reĝo Lear, kvankam tute nobla ĉe koro, tamen estas tro kruda kaj nepolurita en sia karaktero por esti efike helpa en kriza tempo, kaj malaltigas ĝis rango de nura servisto. Ne malpli kornobla, Orlando tamen estas ne alia ol kompatinda, malesperiga ludilo de blinda hazardo, sed sekvata, konsilata kaj fine savita de Rosalindo.

Kontraŭe, preskaŭ ne estas unu dramo, kiu ne prezentas vivbildon de perfekta virino, firmstara en trankvilo espero kaj senerara vivcelo. Koriolano, Desdemono, Izabelo, Hermino, Imogeno, Reĝino Katerino, Perdito, Silvino, Violo, Rosalindo, Heleno, kaj lasta sed eble la plej bela el ĉiuj, Virgilio, estas ĉiuj karaktere senmankaj kaj konceptitaj laŭ plej alta, heroa tipo de la homaro.

Mense notu due, ke la katastrofo de ĉiu dramo estas kaŭzita de la malsageco aŭ kulpo de iu viro: la rebonigo, se ja estas tia, ĉiam efektiviĝas pro la sageco kaj virto de iu virino, kaj se ne estas tio, nenio savas estas. La katastrofo de Reĝo Lear estas pro lia seneco de prudento, lia malspacienca fiereco, lia nekompreneo de la propraj filinoj; la virteco de lia sola fidela idino estas savinta lin de la malbonaĵoj de la aliaj, se li ne forĵetus ŝin: tamen ŝi preskaŭ savis lin malgraŭ ĉio.

Ne estas necese rakonti la historion de Otelo—aŭ pri la ununura malfortaĵo de lia tiele grandega amo—aŭ pri la malsupereco de lia perceptipovo eĉ kompare kun tiu de la ĉefa personino krom unu en la verko, Emilino, kiu mortis ateste kriante kontraŭ lia crarego: "Ho mortiginta plumkapetulo! Kial la Sorto donis tian bonegan edzinon al tia malsagegulo?"

En "Romeo kaj Julieta" la sagaca kaj admirenda kuraĝa ruzo de la edzino estas ruinigita de la maldiskreta senpacienco de ŝia edzo. En "Winter's Tale" (Vintra Rakonto), kaj en "Cymbeline" (elp. Simbelino) la feliĉo

kaj ekzisto de du reĝaj familioj jam perditaj de post longaj jaroj kaj endanĝerigitaj ĝis formorto de la malsaga agado kaj obstineco de la edzoj, estas finfine restarigitaj firme de la reĝinecaj pacienco kaj sagaco de la edzinoj. En "Measure for Measure" (Mezuro por Mezuro) la maljusteco de la juĝistoj kaj la hontinda malkuraĝeco de la frato kontrastas la venkantan verecon kaj diamantan purecon de virino. En "Koriolano" la konsilon de la patrino, se la filo estus akceptinta kaj aginta laŭ ĝi, tio estus savinta lin el ĉiu malbono, sed lia momenta forgeso pri ĝi montriĝas esti la kaŭzo de lia vivruiniĝo. Ŝia preĝo, fine plenumita, savas lin, ja ne de la morto, tamen de la honto vivado kiel la detruinto de lia hejmolando.

Ankaŭe, kion mi diros pri Julio, kies konstanta fideleco kontrastas la facilanimecon de amanto, kiu ne estas pli ol malbona knabo? Kion pri Heleno, ĉiam konstanta malgraŭ la koleretemo kaj ofendado de indiferecanta junulo? Pri la pacienco de Hero, aŭ la koramo profunda de Beatrico, aŭ la trankvile dediĉata sageco de la "reklara knabino," kiu envenas inter la senhelpajn, blindajn, malamikajn pasiojn de viroj, kiel anĝelo milda por savi per sia nura ĉeesto kaj venki la plej krimajn malicaĵojn per sia rideco?

Rimarku plu, ke inter ĉiuj el la ĉefaj virinfiguroj en la verkaro de Shakespeare estas nur unu karaktero malforta—Ofelio. Tiu kortuŝa katastrofo, kiu fermas la tragikan "Hamleto" estas kaŭzita de ŝia tuta, laŭnatura nepovo helpi kaj saĝe gvidi la amaton, kiam li plej urĝe bezonas tion. Finvorte, kvankam troviĝas tri malbonaj virinoj inter la ĉefaj personoj en la dramoj—Lady Makbeto, Regan, kaj Goneril—oni tuj sentas, ke ili estas ja malbelegaj esceptoj je la ordinara virina naturo, malbonigaj en ilia influo ĝuste proporcie al la povo de bonfarado, kiun ili

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Tio, ĝeneraldire, estas la atesto de Shakespeare rilate la karakteron kaj la ĝustan lokon de la virino en la homa vivo. Li prezentas ŝin esti neerareble fidela, saĝa, neelvojigeble justa konsilanto, ĉiam forta por sanktiĝi eĉ kiam ŝi ne povas savi.

Kvankam Sir Walter Scott neniel estas komparinda kun Shakespeare rilate al kompreno de la homa naturo, kaj ankoraŭ malpli, kiam kompreno de la kaŭzoj kaj iradoj de la Sorto estas la parolo, tamen ni turnu nin por ricevi la ateston de verkisto, kiu ja donis al ni la plej larĝan vidon de la kondiĉoj kaj manieroj de la ordinara pensado en la moderna socio.

Mi flankenmetas liajn nure romane-cajn prozaĵojn kiel nevalorojn, kaj kvankam la fruaj romane-caj poeziaĵoj liaj estas tre belaj, ilia atesto ankau estas senvalora, krom se nur kiel knaba idealo, tamen liaj plej bonaj verkoj, kiuj estas studaĵoj el Skota vivo, alportas fidindan ateston, kaj en la tuta verkaro li prezentas nur tri virojn, kiuj ĝisatingas la heroan rangon—Dandie Dinmont, Job Roy, kaj Claverhouse, (elp. Klav'rhaŭs) el kiuj la unua estas Skot-Angla landlima bienetulo: la dua estas ĉefo de vagrabistaro, kaj la tria estas soldato por maljusta almito. Sed estas nur pro iliaj kuraĝo kaj fido, kune kun forta, kvankam nekulturita aŭ malĝuste aplikata intelekta povo, ke tiuj viroj apenaŭ atingas la idealon de heroeco; kaj la pli junaj virfiguroj de Scott ne estas pli ol sinjoro-marionetoj de kaprica fortune, kiuj nur per helpo aŭ bonokazo de tiu sama Sorto, sukcesas travivi, ne venki, la vivpruvon, nevolonte de ili elportatajn. En liaj konceptoj de junaj viroj estas renia signo de disciplinita, konsekvenca karaktero, fervora en saĝe dediĉata celo; renia signo de traktado kun formoj de militanta malvirto definitive spitata kaj kuraĝe venkata.

Kontraŭe, en liaj imagaĵoj de viroj, ĉe Ellen Douglas, Flora Mac-Ivor, Rose Brawardine, Catherine Seton, Diana Vernon, Lilius Redgauntlet, Alice Bridgenorth, Alice Lee, kaj Jeanie Deans, krom preskaŭ senfinaj specoj da karakterbeleco, malkoreco, kaj intelekta povo, ni trovas en ĉiuj tute seneraran kaj neeviteblan de ni senton de digneco kaj justeco, sentiman, ĉiampretan, senlaca memoferon al eĉ la ŝajno de devo, ne parolante pri la realaj postuloj de la Devo. Fin-

fine, trovas pacienca saĝeco de forte regata amo, kiu faras multege pli ol pure gvide ŝirmi la amatojn de eblaj sekvaĵoj de momenta eraro; tiu saĝeco grade formas, animvivigas kaj altigas la karakterojn de la neindaj amatoj ĝis tia grado, ke je la fino de la rakonto ni havas ĝustan sufiĉon da pacienco, sed ne pli ol sufiĉon, por sciigi pri ilia nemerita sukceso.

En ĉiu okazo, do, ĉe Scott, kiel ankau ĉe Shakespeare, ĝi estas la virino, kiu gardas, instruas, kaj gvidas la junulon; ĝi estas neniam, neniel, la junulo, kiu faras tion por la amatino.

(Nun sekvas atesto de la glora Dante, tiu de la antikvaj Egiptanoj, Grekoj, Skandinavo kaj aliaj).

El la Angla trad. ROBO, Melbourne.

SYDNEY—A JARRAPORTO.

En la kunvenejo de la "Sydney Esperanto-Societo" ĉe Rawson Chambers, Rawson Place, je 30a junio, kunvenintaj anoj atente aŭskultis la jarraportojn de diversaj komitatanoj.

Legante sian prezidantan raporton, s-ro F. T. Simon, diris: "La societo povas esti kontenta kun la faradoj kun la pasintaj dekdu monatoj; seninterrompe daŭris la semajnaj kunvenoj kun sistema instruado kaj interesaj alparoladoj, monataj dancadoj multe kontribuis al socia amuzaĵo, bona propagando okazis, vizitantaj fremdlandaj samideanoj pruvis la disvastigon de nia lingvo, kaj finance la situacio iom pliboniĝis. Sed de membreca vidpunkto la klubo ne sufiĉe kreskis, kiel meritas urbejo kun miliono da enloĝantaro. Tion nur povas helpi individua eksterklubeja klopodo por superi lokaj kondiĉoj kaj tiu punkto devas esti bone konsiderata dum la venonta jaro.

"La pli sukcesaj kunvenoj okazis je Zamenhofa Vespero kaj ĉe koncerto por monprofiti la U.E.A.

"Instrua fako ĉiam estas la plej grava en nia movado, ĉar per la instrumaniero oni aŭ faras bonajn esperantistojn, aŭ nur diletantojn. Du apartaj grupoj funkcias por la membroj, unu por komencantoj kaj alia por progresantoj, ambaŭ kun bonaj rezultoj."

Post legado de longa listo pri alilanda progreso (precipe por tagjurnalaj raportistoj), la prezidanto speciale laŭdis s-ron H. Davies pro lia dumjara plibonigo kaj sindediĉo, kaj dankis la socian komitaton, konsistanta el f-inoj M. Harwood, V.

Fairfield, M. Cullington kaj s-ro V. Rutland, pro la multaj sukcesaj aranĝoj. La diversaj instruistoj ankaŭ estis dankitaj.

S-ro Sekretario Leslie Pfahl limigis sin al lokaj aktivecoj, rakontante ke dum la jaro kurso de 12 lekcionoj estis disaŭditaj de 2KY (Trades Hall Broadcasting Station), kaj 9 paroladoj, enhavante 5 lekcionoj, de 2FC (Farmer's Broadcasting Service). La Aŭstralia Registaro oficiale permesis la eksterlandan forsendon de Esperanto-telegramoj kiel "klara lingvo," konforme al la deziresprimo de la Internacia Telegrafa Unio, kaj alimaniere raportis ci-tiean antaŭenmarŝon.

La kasistino, f-ino V. Fairfield, laŭtlegis la financon staton, montante ke ĉe neprofitema societo, kiel la esperantistaj ĉiam estas, aferoj sufiĉe bone staras por pagi ĉiujn kuran-tajn elspezojn.

Aliaj raportoj estis tiuj de la kont-kontrolisto, s-ro D. Healy, kaj la bibliotekistino, f-ino M. Cullington. Ĉiuj estis akceptitaj.

Oni tiam iris al elekto de nova komitato, kiu rezultis jene:—Prezidanto, S-ro. F. T. Simon; Viv-Prezidantoj, S-ro H. Davies kaj D. Healy kaj S-ro. C. Ostler; Sekretario, S-ro L. E. Pfahl; Kasistino, F-ino V. Fairfield; Bibliotekistino, F-ino M. Cullington; Kontkontrolisto, S-ro. H. Torr.

Inter diversaj estis diskutita malaltigon de la kotizaĵo, laŭ propono de s-ro. Rutland kaj subtenata de s-ro. Healy. Fine, la ĉeestantaro unuanime decidis malaltigi ĝin al 10/- po jare provizore por ses monatoj, kiam revuo de la situacio devas okazi.

S-ro Pfahl proponis, ke estone nur lingvaj aferoj estu allasataj kiel temo sur la programo. Oni vigle kontraŭis la proponon, kiu estis malakceptita.

La kunveno ĉesis je 10.10 p.m.

DESCARTES LISTENS-IN.

Descartes lived in an age that knew nothing of the crying need of 1926. He saw no League of Nations Assembly with representatives of fifty or more states laboriously doing their business in several languages. He saw no air transport services, which in a few hours land in half a dozen countries of different speech: he saw nothing of the hundred and one in-

terests that to-day strive to surmount the language barrier by wasteful and expensive translation. What would the philosopher think if he could see us to-day, in spite of our marvellous advance, still submitting to the tyranny of the tongue?

The foolishness of the matter would come out prominently, perhaps, were Descartes to tune-in on an up-to-date receiver:—En 18 Abril de 1925 teve lugar a la Conferencion Internacional, que aprovon de Esperanto como lingua auxiliari nes relacoes internacionais pelo Radio" . . . (Here he turns the condensers) . . . "Zustavme Prozetelnosti aby ridila asudy narodu. Snad jest jejim umyslem, by naro—" (another turn) . . . "onder den Nederlandschen handelstand—" (another) . . . "reproducido ahora es analogo, pero—" (again) . . . "la grammaire, a - t - on dit, est la logique des enfants—" (again) "hele Auditoriets Tilslutning i sine Betragtninger—" "Sie kammt es mit goldenen kamme, und singt ein Lied dabei: das—" (again) "Un giorno predicava in una parocchia di Madrid" . . . (yet again) . . . "nas tat, Akonchen moj trud mnogoletnij—" (and again) . . . "apa rece pe ai sei—" . . . (yet another turn) . . . "kazdy w swoim kotka—" . . . "as buvav jaun's bernelis kajp jovaras—" . . . "Tin idha ksanthula tin idha pses aga—"

Not being used to ethereal artillery the philosopher blanched at the barrage of atmospheric and Morse which closed, not unfittingly, this characteristic "parliament of man." "I suppose you understand all these people?" he remarked. "As you have been clever enough to harness the ether, you have also, I dare say, devised some means of understanding all languages?"

I somewhat shamefacedly explained to Descartes that in this matter the world was rather worse off than when he left it: that there were more languages that "count," and less time to learn them: that after much study few ever attained more than "travel phrase" proficiency. "Of course, I caught what Paris said—for we all know French until we meet a Frenchman. I knew the German by the "mit" and "und," and one was Dutch for the condensers stood at the Amsterdam wavelength: and the last station—" "Astonishing," ejaculated

Descartes, "to send words thousands of miles at the speed of light only for them to fall on ears as good as deaf. Do you paint pictures for blind folk? But why did I hear no Latin?" "Well, sir," I answered, "Latin is not so much used as in your time; it takes too long to learn, lacks a multitude of words necessary to-day, and its pronunciation varies in different countries." My "English" Latin made the philosopher laugh, so I tried to turn the talk to the musical uses of radio "Music. Well it has always been an international language," said Descartes, "but words are great helps, and there are foolish folk who like a song better for knowing what it's all about. But, if Latin is too hard, what of French?" "Oh, we cannot agree as to the language to be used," I answered, "strong claims are made for German, Spanish and English. National sentiment, immense commercial advantage and suchlike will always prevent any general agreement to use as an international language any modern tongue. May the tongue of Milton never be pidgined by the nations. The English of Japan, of the Pacific Islands or of Sweden should be sufficient warning. This applies to any other modern tongue." (To be continued.)

PAROLOJ EL BRISBANA RADIOSTACIO.

La jenaj datoj estas fiksitaj por la propagandaj paroloj pri Esperanto el la stacio 4QG de la Kvinslanda Ŝtata Radioservo, Brisbano:

Mardo	16 aŭgusto
ĵaŭdo	1 septembro
mardo	6 septembro
mardo	13 septembro
mardo	20 septembro.

La horo difinita estas la 6, 15 vespere. La parolanto estos nia konata samideano sinjoro Maŭrico Hyde.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Argentina Esperantisto, 9, 1; Amerika Esperantisto, 1; British Esperantist, 267; Belga Esperantisto, 5; Bulteno Antverpena, 6; Bulteno de Esperanta Preso-Agentejo, 1; Der Arbeiter-Esperantist, 6; Esperanto, 321, 322; Germana Esperantisto, 4, 5, 6; Heroldo de Esperanto, 21, 22, 23; International Language, June; La Fervojisto, 4; Libera Laboristo, 5; La Revuo Orienta, 5, 6; La Progreso, 4, 5; Oomoto Internacia, 16, 17, 18; Pedagogia Revuo, 5-6; Revista del Ateneo, 3; Svenska-Tidningen, La Esperanto, 5; Verda Mondo, 5; Verda Stele, 6.

BRISBANE ESPERANTO CLUB
kunvenas la trian Mardon ĉiumonate, 7.45 p.t.m., ĉe State Service Union Room, trian etaĝon, King House, Queen Str. Vic-Prezidanto, C. Kidd. Sekretariino, Miss E. B. Carrick, Office of Supt. Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro N. Grant; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, 323-325 Bourke Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.